



# LA JUNIA VIVO



## ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### „PATRINO DEL' DOLOROJ!” (daŭrigo).



Post la akcidento Patro estis senkonscia; oni portis *lin* al la malsanulejo. S-ro Bonavento sekvis la bran-kardoN. La kuracisto jam tuj diris, ke ne plu estas es-  
pero kaj oni avertis la pas-  
troN.

Post tre mallonga tempo la paciento mortis. S-ro Bo-  
navento restis ĉe *sia* amiko  
ĝis la fino.

Ĉar li nepre deziris per-  
sone komuniki singarde la  
teruraN novaĵoN al la edz-  
ino, li prenis la aŭtobusoN al  
Telde kaj iris al la domo.

Dum la vojaĝo returne kun

Patrino li denove parolis pri la tre kritika situacio, diris fine, ke la kuracisto ne plu donis esperoN. Antaŭ ol ŝi atingis la malsanulejoN, Patrino jam sciis, ke ŝi ne plu vidos *siaN* edzoN dum *lia* vivo.

Ili devas atendi dum kelka tempo en la halo de la malsanulejo. Tiam venas pastro. Ĉar li vidas, ke Patrino jam scias ĉioN, li kondukas *lin* al la funebra kapelo. Ili eniras kaj estas en malgranda

ejo. Rekte antaŭ *ili* estas simpla altaro kun krucifikso. Super ĝi brulas la eterna lampeto. Antaŭ la altaro staras la katafalko kun nigra tuko; apud la katafalko estas kelkaj preĝaj benketoj, dekstre kaj maldekstre du grandaj lignaj kandelingo. La kvar kandeloj brulas.

La pastro iras al la katafalko kaj forŝovas la tukoN. Li turnas *siN* al Patrino, diras kelkajn afablajn vortojN, volas konsoli *ŝiN*. Ŝi ne respondas, ŝi ne ploras, ne lamentas. Malrapide ŝi iras al preĝa benketo, genufleksas kaj komencas preĝi. La aliuloj preĝas kun ŝi.

Post kelka tempo oni volas forkonduki *ŝiN*, sed ŝi rifuzas, diras simple „Lasu miN”. La pastro foriras, s-ro Bonavento restas ĉe ŝi.

Tie Patrino restas dum la tuta nokto kaj preĝas; preĝas por la edzo, por la infanoj, petas fortoN por *sia* granda tasko. Kiam la unuaj radioj de la suno falas tra la fenestroj, ŝi ekstaras kaj iras returne al *sia* hejmo. Tie atendas ses infanoj. Ses junaj infanoj dependas de ŝi.

## 2 Verkaĵoj de junaj legantoj:

### Ĉu vi konas la „Juraasan montaron”?

(verkaĵo de knabino kiu ĉijare komencis lerni Esp.).

La Juraasa montaro kuŝas en la oriento de Francujo kaj plilongiĝas norden en Svisujo.

Pontarlier estas urbeto ĉe la rivero „Doubs”, ĉe la piedo de la monto „Larmont”. Tiu monto estas alta 1.200 metrojn.

Ĉirkaŭ la urbeto estas bela kamparo kun herbejoj kaj abiaj arbaroj. Ili supreniras la monton ĝis la pinto.

Je dek du kilometroj de Pontarlier estas blua lago. En ĝi oni povas baniĝi dum la somero. Dumvintre la akvo ofte glaciĝas.

En la Juraasa montaro estas multaj grandaj fontoj.

Je dudek kilometroj de Pontarlier estas belaj montoj, de kie oni vidas la Alpoj. La svisajn Alpoj, kaj ankaŭ svisajn lagojn, ĉar Pontarlier kuŝas proksime de la svisa landlimo.

La Esperanto-grupo de Pontarlier kunvenas en Junulargastejo. En tiu domo oni akceptas fremdulojn, kiuj volas koni nian belan regionon.

Kalina Yvette, Pontarlier, Francujo.

**Atentu!** La sekvonta No de LJV aperos en septembro.  
De 1—20 aŭgusto TJO-Centro estos fermita

## Nia klubo.

La unuan fojon ni kunvenis je la kvara de majo en 1947a. Tio estis por la granda demonstracio, rememore al la liberiĝo. Ni atendis apud la granda ŝtono ĉe la 's Gavenlandseweg. Poste ni foriris en grupo al la ĝardeno apud la urbdomo. Estis multaj homoj Ni kantis kun la tuta loĝantaro, kaj iris en longa procesio tra la komunumo. Tiam ni disiĝis.

Je la deksepa de majo estis festvespero de La Estonto Estas Nia. Ni tiam revidis multajn kamaradojn. Ni estis ĝojaj, ĉar ni revidis unu la alian, kaj ni parolis multe. Ni interkonsentis, ke ni la venontan dimanĉon kunvenos ĉe kamarado H. Uittenbogaard. Al tiu kunveno venis multaj. Ni decidis fondi klubon. Kaj ni ĉiun dimanĉan posttagmezon vizitas ĝin. La nomo de nia klubo estas „La Kukolo”. Nia sekcia himno estas ankaŭ „la Kukolo”.

Batali por Esperanto signifas batali por la progreso!

Verkaĵo de J. A. Wallenburg, Hilversum, Ned.

## Friĉjo.

Li estas nur eta bubeto de kvin jaroj. En nia strato ĉiam venas ĉaro, por forporti la malpuraĵojn. En la mateno la patrinoj do metas la ujojn kun malpuraĵoj, difektitaj objektoj, ktp. antaŭ la domojn. Friĉjo bone scias tion, kaj ĉiam li iras serĉi en ili, ĉu li trovas ion laŭ sia plaĉo. Liaj ĝepatroj malŝatas tion, kaj jam kelkfoje policisto forpelis lin. Friĉjo ne komprenas kial. Li diras al la patrino: „Kiam mi estos granda, mi fariĝos policisto!”

„Kial???”

„Ĉar mi tiam povos serĉi en ĉiuj ujoj por malpuraĵoj!”

Jes, vere, Friĉjo estas petola knabeto. Preskaŭ ĉiun tagon li ŝiris sian pantalonon, ĉar li ludis ĉe pikildrato. Lia patrino tre ri-proĉis al li. Hodiaŭ li venis al la domo, kaj diris: „Nun mi jam dudek fojojn grimpis trans la pikildraton, kaj pli ol dudek fojojn mi rampis tra sub ĝi, kaj mi tute ne ŝiris mian pantalonon!”

## Fablo (modernigita).

Eks-membro de la Suda Esperanto-Klubo iris al la Norda Esperanto-Klubo. Li intencis aliĝi al ĝi. Li renkontis alian junulon. Li demandis: „Kia estas la Norda Esperanto-Klubo? Mi volas aniĝi”.

„Nu,” diris la alia, „kia estas via propra, Suda Esperanto-Klubo?”

„Ho! aĉa! Ĉiuj malakordas. Oni faras nenion. Terura ejo!”  
„Do, mi bedaŭras diri, ke vi trovos en la Norda Klubo la samon.”  
Post kelkaj tagoj alia eksmembro de la Suda Klubo renkontis la junulon. Li faris la saman demandon, kaj denove la junulo demandis pri la propra klubo.  
„Ho bonega! Ĉiuj agemaj, bela amikeco, multon por fari, mirinda ejo!”  
„Tio tre plaĉas al mi. Vi trovos, ke la Norda Klubo estas tute sama!”

**Memoru, ke via klubo estas tia, kia vi mem faras ĝin.**

J. Kon Walsh, Leeds, Brit.

### **Rekordo.**

„Via febro atingis jam la 41-an gradon, kara amiko”, diris kuracisto al fervora sportulo. „Tio estas alta, tre alta!”  
„Ĉu vere? Kaj kio estas la monda rekordo?”

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.

### **En la vagonaro.**

Sinjorino: „Ĉu vi volas helpi min, sinjoro, kiam mi devos eliri?”  
Sinjoro: „Kun plezuro, sinjorino”.  
Sinjorino: „Vi sciŭ, sinjoro, mi estas iom dika, kaj mi devas ĉiam eliri dorsantaŭe. Tiam la portistoj pensas, ke mi volas eniri, kaj ili repuŝas min en la veturilon”.

### **Maljuna bifsteko.**

Joĉjo (4-jara) longe rigardas al bifsteko sur sia telero. Subite li diras: „Ĝi estas tre maljuna!”  
„Kial?” demandas la patrino.  
„Ĝi havas multegajn sulkojn!”

J. N. Pottier, Quimper, Francujo.



## **INTERNACIA JUNULARKUNVENO**

**en Groet, Nederlando (4—11 aŭg. '48).**

Ĝojiga novaĵo: Ni ricevis la oficialan permeson por la granda barako! Do estas certeco pri vastaj dormĉambroj, lavejoj, kaj granda festsalono kun scenejo. Al la artistoj inter la partoprenantoj nun la tasko uzi tiun scenejon!! Sed ne nur artistoj, ĉiu gasto certe partoprenos en la programoj! Ĉu vi jam havas la „La Juna

Vivo"-kantaron? Ĝi estos nia komuna kantaro, do ĉiu nepre posedu ĝin! Se vi ankoraŭ ne posedas ĝin, vi mendu ĝin ĉe TJO-Centro en West-Graafthdijk (Prezo 0,75 guld).

Ni afable petas, ke ĉiuj partoprenantoj pagu la plenajn kostojn antaŭ 1 aŭgusto (ĝirkonto 330139, M. v. d. Horst, Rotterdam).



Diverslandaj partoprenantoj de la 1-a Internacia Junular-Kunveno en Groef, en 1938 antaŭ la grandega stelo el floroj, kiu staris antaŭ la restadejo.

### Provizora programo:

*Merkredon:* En la posttagmezo alveno de la partoprenantoj el Nederlando, Francujo, Germanujo, Hungarujo, ktp. Vespere: Salutparoloj, dividado de la labortaskoj, kantado, ktp.

*Ĵaŭdon:* Matene: promenado en la ĉirkaŭaĵo de Schoorl.

Je la 13-a horo alveno de la britaj grupoj. Poste fotografado de la A.N.P. (Ned. gazetarservo).

Vespere, je la 20-a horo: Oficiala malfermo de la 4-a I.J.K. Prelego pri la 10-jara ekzistado de T.J.O. Komuna kantado. Muzikado.

*Vendredon:* Ekskurso per ŝipo tra Nord-Holando. Unue per la ŝipo al Alkmaar, kie ni vizitos la mondfaman fromaĝfoiron. Poste laŭ la Nordholanda kanalo preter West-Graafthdijk al Purmerend. De tie laŭ la poldera kanalo ĉirkaŭ de Purmer al Edam. Interkonatiĝo kun la Edam-anoj. Vizito al Volendam. Tranoktado en Edam.

*Sabaton:* Daŭrigo de la ekskurso al Amsterdam, preter Monnikendam kaj Broek in Waterland. Promenado tra Amsterdam kaj vizitado al kelkaj vidindaĵoj. Reveturo al Schoorl laŭ la pentrinda Zaan-regiono.

*Dimanĉon:* Libera mateno. — Diservo. — Posttagmeze Internacia Labor-kunsido. Vespere: Brita vespero ( teatraĵoj, dancoj, kantoj, s-ro Perris, angla magiisto, prezentas sin).

*Lundon:* Komuna promenado tra la dunoj al la marbordo: ludado kaj banado. Manĝado sur la marbordo. — Posttagmeze faka kunsido de la instruistoj. — Vespere: Holanda vespero ( teatraĵoj, dancoj, kantoj).

*Mardon:* Matene: por la pli junaj promenado tra la arbaroj en la dunoj, sub la gvidado de Schoorl-anoj. Por la pli aĝoj s-ro S. de Jong prelegos pri: Naciismo, Sennaciismo kaj Internaciismo (kun debato).

Posttagmeze: liberaj promenadoj. Vespere: Granda adiaŭa festvespero. La diversaj partoprenantoj montros kion ili povos.

*Merkredon:* Je la 11-a horo: adiaŭaj paroloj. Fermo de la kunveno. Posttagmeze: foriro de la partoprenantoj.

**Ricevitaj donacoj:** S-ro P. K. en Amsterdam: 5 guld; S-ino W-C en W-Grafdijk: 3 guld; Bets kaj Bertha W. en West-Grafdijk: 2 guld; F-ino T. H. en Leeuwarden; 2,50 guld; S-ino de B.-B. en Oosthuizen: 25 guld; A. J. en Leeuwarden: 7,50 guld; LEEN-Sekcio Edam: 2,50 guld; F-ino H. P. v. B. en Zeist: 5 guld; S-ro A. en Wormerveer: 5 guld; F-ino en Venhuizen: 2,— guld; f-ino D. d. Gr. en N.Niedorp: 5,— guld.

**Korekto:** En la junia No staras: „La Norda Stelo”: 2,50 guld. Tio devas esti: 20 guld. Entute ni do ricevis ĝis 26-6-'48: 148,— guld.

Elkore ni dankas al ĉiuj, kiuj sendis donacojn por ebligi al ne-nederlandanoj la partoprenon! Tamen — la sumo ankoraŭ ne sufiĉas. Afable ni do petas ĉiujn, kiuj komprenas la grandan valoron de nia kunveno, helpi per mondonacoj! Anticipe nian dankon!

Multan dĉankon ankaŭ al tiuj, kiuj sendis manĝajkuponojn.

**Ĝis nun anoncis sin 270 partoprenantoj.**

### Kanto de la Groet-Tendaro.

Inter dunoj orumitaj,  
Ĉe belega vasta mar',  
Kantas en amika rondo  
La tutmonda junular'.

Rekantaĵo:

Junaj ni estas, gajaj ni estas,  
Suno kaj luno ridetas al ni.  
Junaj ni estas, fortaj ni estas,  
La estontec' apartenas al ni!

En ripozo ĉerpas fortojn  
Juna korpo kaj anim';  
Ĉiujn zorgojn, vivobatojn  
Akceptadas ni sen tim'.  
(renkantaĵo).

Ludm. Jevsejeva.

Nia bedaŭrinde tro frue mortinta latva amikino dediĉis la supran kanteton al la 1-a Int. Junularkunveno en Groet, (1938).



### SKOLTA RUBRIKO.

Ĉi tiu jaro estas la trideka jaro de la ekzistado de S.E.L.

Post kiam Baden Powell konsilis al ĉiuj skoltroj la lernadon de Esperanto brita trupestro, d-ro Avoto, fondis Esperanto-Asocion por skoltroj. Post la naskiĝo de SEL pluraj skoltfederacioj oficiale konsentis pri la taŭĝeco de Esperanto.

Nia lingvo estas akceptita kiel taŭga lingvo en la skolteksamenoj por tradukistoj. Por akiri la ateston kaj la insignon de tradukisto kandidato devas paroli Esperanton aŭ iun nacian lingvon.

Antaŭ la milito la Skolta Esperanto-Ligo havis membrojn en pli ol 32 landoj. Post la milito okazis Esperanto-kongreso dum la ĵamboreo en Moisson (Francujo). Kvankam la antaŭa skolta kongreso en Stokholmo deklaris, ke Esperanto prezentas nenian intereson por la skoltoj, la skolta opiniantaro montriĝis favora al Esperanto.

Okaze de la ĵamboreo multaj skoltoj lernis Esperanton. Kvankam mi ne scias, kiom da skoltoj parolas nian lingvon, mi esperas, ke post kvar jaroj, en la proksima ĵamboreo, oni larĝe uzos la help-lingvon.

Zigzagirema hipopotamo (eksrotestro en Most, Bohemio).



### T.J.O.-RUBRIKO.

*Sekr. M. v. d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam-N., Ned.*

Dum la I.J.K. en Groet okazos laborkun-sido de T.J.O. Dum tiu kunveno ni i.a. devos elekti estraron. Ĉar la estraro malpliĝis ĝis kvin personoj necesas aldoni kelkajn. Unu-  
loke ni bezonas novan sekretariojn, ĉar la nuna ne povas okupi sin pri la sekretarioj kaj la financoj. Tiu duobla funkcio estas tro peza por unu persono. Tial ni esperas ricevi kandidatigojn antaŭ la laborkun-sido. Ni nepre kalkulas je tio!

La jarraportoj aperos en aparta bulteno („Peranto”). TJO-anoj jam povas mendi ekzempleron, por ke ili ricevu ĝin tuj post la apero.

**Belgujo:** La adreso de la belga ĉefperanto nun estas: 36 rue du Radoux, Braïne-le-Chateau. **Gironumero 806765.** Belgoj bone notu tion!

**Francujo:** La francoj bonvolu atenti la novajn kotizojn: kun 16-paĝa eldono de LJV: 200 fr. fr., kun 8 paĝa eldono 80 fr. fr.

En la pasinta jaro ni ricevis jenajn donacojn por la ĝenerala kaso (la sumoj estas esprimitaj en ned. guld): s-ino M. en N.Y. (Usono): 10,09; P. en A. (Ned): 10,—; J. M. en U. (Ned): 1,—; f-ino H. en A. (Franc): 2,25; L. en L. (Ned): 1,—; F. M. en L. (Ned): 0,50; J. M. en U. (Ned): 1,—; J. M. en U. (Ned): 3,05; S. en M. (Brit): 5,40; B. en S. (Ned): 1,81; S-ino M. en N.Y. (Usono): 10,11; K. en A. (Ned): 1,—; F. en U. (Ned): 1,—. (Plue la grandan donacon de 349,18, pri kiu ni jam raportis en la aprila No).

M. v. d. Horst.

## KORESPONDADRESOJ.

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Aŭstrujo:** 50 lernantoj (12-14-j) dez. kor. kun la tuta mondo. Resp. certa. Skribu al: A. Konecny, Wien 17, Lienfelderg. 96 (Hauptschule).

Kiu nederl. aŭ alia Esp. klaso volas en junio '49 fari kun ni ekskurson tra Aŭstrio? Skribu al la supra adreso.

**Bulgarujo:** 15-j. knabo dez. kor. kun ĉiuj landoj, prefere kun gelernantoj. Ivan Zojnov, str. I No. 125, Peŝtera.

Hristo Dim Buĝnakot, str. Pobornská 10, V. Tirnovo (gimnaziano) dez. kor. kaj interŝ. il poŝtkartojn, librojn, gazetojn, fotografajojn.

**Ĉeĥoslovakujo:** Mi dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtkartojn. Certe respondos. Skribu al f-ino Anna Slejbalová, Pardubice, v. Ráji 1267.

Jaroslav Bernatik, Prostr. Suchá, 242, Teŝiinsko, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Interŝ. il poŝtk. kaj poŝtm. Respondo certa.

20-j. skolto Jiri Sobotka, Ciska Lipa 197, dez. interŝanĝi skoltajn insignojn, gazetojn, fotografajojn, ktp. kun geskoltoj. Resp. certa.

**Finnlando:** Finnlanda instruisto deziras kontakton kun geinstruistoj en ĉiuj landoj. Lauri Lehtola, Hämeenlinna, Alajoki.

**Germanujo:** Hans-Horst Weigmann, Hannover-Döhren, Peinerstr. 22 K, dez. kor.

La 3 infanoj de Herbert Schwedler, (15 b) Kötschau Nr. 17, post Grossschwabhausen über Jena/Thüringen (sov. zono) dez. kor. k. interŝ. il poŝtk.

**Nederlando:** La R.Katolika Esp. klubo „La Katolika Stelo”, p/a C. Meyer, De la Reystr. 92 B, Rotterdam, dez. kor. k. ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

**Skotlando:** Ella Heggie, 168 Taylor St., Aberhill, Methil, Fife, (14-jara) kaj Betty Slater, 61 Herriot Crescent, Methil, Fife, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

La 20-an de julio geedziĝos Germaine Mallet kaj Gregoire Maertens Assebroek, Belgujo.	Ĉu vi jam posedas la broŝuron eldonitan okaze de la 10-jara ekzistado de TJO? Mendu ĝin ĉe TJO-Centro en West-Graafthijk, Nederlando. Prezo 0,20 guld. aŭ - respondkupono.
---	--

<b>SUB LA VERDA STANDARDO.</b> Nova Esperanto-lernilo laŭ la rekta metodo verkita de P. Korte, lernejestro. Eld. J. Muusses, Purmerend. La plena metodo konsistas el: Gvidilo (nur por la instruisto): 2,50 guld. Laborilo I kaj II, prezo po 0,90 guld. Memorigilo: 0,50 guld.	<b>PROPAGANDU PER LA TJO-POSTPAPER.</b> 50 folioj kaj 50 kovertoj: 2,— guld. 50 kartoj: 0,75 guld.
	<b>REE HAVEBLA</b> <b>Bindita jarkolekto „LJV” ’35—’36.</b> Belaspekta libro, enhavanta rakontojn, anekdotojn, kantojn enigmojn. <b>Prezo 1,— guld. (plus afranko).</b>

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO** estas la ampleksa tutmonda Esperanto-Organizaĵo, kies supertendenca, neŭtrala sinteno permesas la aliĝon de kiu ajn Esperantisto. Per sia delegita reto, kiu ampleksas preskaŭ la tutan mondon, ĝi donas altvaloran servon al la praktika Esperantisto, por kiu la jarlibro de UEA estas konstanta konsultilo. Petu senpagan prospekton ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.